HEJS

JUNULARA SEKCIO DE HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

REDAKTORINO:
F-INO ITZIAR ARTECHE

Nro. 86 - 1974

Str. Barrencalle Barrena, 7 - 1.ª
Telefono 24 44 92 - BILBAO-5



# ENHAVO

Notoj . . . . . . . . . . 1
Kotizoj . . . . . . . . . 2
Bilanco . . . . . . . . . 3
IS de G.E.J.. . . . . . . 4
Nova jaro . . . . . . . . 5-6-7
Nova estraro . . . . . 7-8
1ª Aŭtuna jum Katal renk. 9
Recenzoj de kontakto. . 10-11-12

La enhavo de la artikoloj ĉitie publikigitaj ne reprezentas la oficialan opinion de H.E.J.S. escepte en okazo de oficiala komuniko; ĝi ankaŭ ne reprezentas opinion de la redaktorino/do, pri la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

# NOTOJ

.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.

--Ni ĉi-jare trafis la ĝustan numeron por ricevi kvinoblon en nia loterio.
Sed, malgraŭ nia nacia celo, preskaŭ la tuton oni vendis nur en Bilbao.
Ĉu HEJS estas nur Bilbao ???.

$?$?$?$?$?$?$?$?$?$?$?$?$

--Ni havas aliĝilojn por la Printempa Kultura Semajno okazonta de la 23-a ĝis la 29-a de Marto en la "Kastelo de Grésillon" ( Francujo ).
Temo traktota estas "Junularo kaj Esperanto".



. . . . . . . . . . . . . . .

$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$

# K O T I Z O J

$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$

HISPANE-hispane-HISPANE-hispane-HISPANE-hispane-HISPAN

Todos los que no han pagado la cuota de este año, 100 Pts, pueden pagarla al HEJS-delegito correspondiente o enviarla mediante giro a HEJS (no a un directivo), o mejor ingresarla en nuestra cuenta nº 01-332235-2 del Banco de Vizcaya, enviándonos el duplicado.

Los miembros de HEF, deben pagar aparte la cuota de HEF directamente a la Federación.

ESPERANTE-esperante-ESPERANTE-esperante-ESPERANTE-espe

Ĉiu kiu ankoraŭ ne pagis la kotizon, 100 Ptoj., bonvolu pagi ĝin al la koncerna delegito en sia urbo. Se tiu ne ekzistas, bonvolu sendi ĝin al HEJS (ne al iu estrarano) per poŝtmandato, aŭ, pli bone, enspezi ĝin en nian konton nº 01-332235-2 de la "Banco de Vizcaya", sendante al ni la duplikaton.

Kiuj ankaŭ estas membroj de HEF devas sendi la Hef-kotizon rekte al la Federacio.

NOTOJ-NOTOJ-NOTOJ-notoj-notoj-notoj-NOTOJ-NOTOJ-notoj-n

--Oni instruas per korespondado senpaga:

Madrida Fervojista Esperanta Grupo
Atocha, 83- M A D R I D - 12

.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.

-- 15ª Eŭropa Feriosemajno en Svislando ( EFS )

Organizita de Svisa Asocio de Esperanto-Fervojistoj (SAEF), ĝi efektiviĝos ĉi-jare de la 22ª ĝis la 28ª de septembro 1974 en M a g l i a s o, ĉe la bordo de la Lugano-lago, dekon da kilometroj okcidente de Lugano, facile atingebla per fervojo aŭ aŭto. La programo ampleksas gvidatajn ekskursojn variajn, E-lecionojn diversgradajn, vesperajn aranĝojn distrajn.

## NOVA JARO EN NIA SEKCIO

Karaj HEJS-anoj:

Nova jaro alvenis. Ĉu nova vivo ekestos en nia organizo?. Tio dependas de la kunlaboro de vi ĉiuj, cele al la disvastigo de nia movado.

Ĉijare, same kiel en la pasinta jaro, novaj ideoj - kaj projektoj atingas nin kaj postulas nian atenton. La pasintjaraj spertoj montris al ni niajn verajn eblojn, t.e. iomete seniluziigis nin. Tamen, surbaze de realeco ni starigas novajn projektojn, laŭ ni pli ambiciajn ol tiuj antaŭaj. Ni petas al vi por ili vian plej entuziasman kunlaboron, kaj viajn sugestojn por pli bona efiko.

Kaj jen niaj projektoj:

1ª) Helpo al la E-lernado en hispanlingvaj landoj.- Nuntempe, la E-movado ekestas en la sudamerikaj landoj: Kubo, Kolombio, Ĉilio, k.t.p.. Ni deziras helpi la tieajn E-lernantojn pere de lernolibroj kaj instrua korespondado, kiu je la komenco komprenebIe devos esti hispane.
Por tiu agado ni petas al vi vian kunlaboron pere - de mono, lernolibroj kaj sinofero korespondi kun la tieaj lernantoj. Ni atendas vian respondon por ekagi en - tiu kampo.

2ª) Pligrandigo de nia membraro: La forto de organizo baziĝas en la nombro kaj aktiveco de la membraro. Pro tio, ni deziras lanĉi varbkampanjon laŭ la frazo : Ĉiu membro varbu novan . Ĉi tiu kampanjo enhavas du celojn: tiu unua estas pligrandigo de nia sekcio; tiu dua estas la varbado de novaj membroj por TEJO, ĉar ĉiu varbinto de nova membro ricevos ekzempleron de "Kontakto", la - plej interesa junulara E-revuo eldonata de la Tutmonda Esperantista Junulara Organizo. Ni deziras ke plejparto el niaj membroj estu ankaŭ membroj de TEJO, por plifortigi la internacian E-movadon en junularaj medioj.

3ª) Konkurso por kovrilpaĝaj fotoj: Malgraŭ la malsukceso de nia pasintjara konkurso pri artikoloj, kaj esperante ke la fotemo de nia anaro estos pli granda ol ĝia verkemo, ni kreas konkurson pri fotoj publikigeblaj en nia kovrilpaĝo, sur la jenaj bazoj :

a) Ĉiuj membroj de HEJS rajtas partopreni, sciigante nin pri sia partopreno pere de la vortoj : " Por konkursi " skribitaj sur la koverto apud nia adreso.

b) Ĉiu foto devas esti blanknigra originala, memfotita; ni fidas je via honesteco pri tio. Oni devos al doni esperantan frazon rilatantan al la foto.

c) Formato: Ĝi devos esti inter 7 x 10 kaj 10 x 15 cmg.

ĉ) Valorigo: Oni valorigos la artan lertecon de la foto, ĝia temo, kaj la oportuneco de la aldona frazo.

d) Premio: Principe, nur estos unu : 1.000 Ptoj. Tamen, la juĝantaro povos laŭvole krei kelkajn subpremiojn.

e) Juĝantaro: Oni formos ĝin pere do estraranoj de HEJS, konvene konsilitaj de fakuloj.

f) Templimo: Oni akceptos fotojn ĝis la 1ª de Novembro 1.974, kaj la verdikto aperos en la lasta ekzemplero de nia ĉijara revuo. La verdikto estos neapelaciebla, sed povos ne esti verdikto.

g) HEJS rajtas publikigi ĉiujn fotojn ricevitajn, laŭvole.

h) Ĉiu kiu konkursos ja libere akceptas la supreditajn bazojn.

4ª) Eldono de nia bulteno: Ni deziras ke ĉi-tiu bulteno estu vera ligilo inter ni ĉiuj kaj samtempe pritraktu esperantlingve ĉiujn aktualajn temojn. Ni proponos en ĉiu revuo temon pri kiu ni petas al vi bonvolu sendi malgrandan komentarion. Ni deziras publikigi kune ĉiujn ricevitajn komentariojn. Kompreneble, ankaŭ ĉiuj artikoloj (esperante skribitaj) estos bonvenigitaj. Ankaŭ ni petas al vi bonvolu sendi skizon pri konvena disdivido de la paĝoj laŭ temoj.

5ª) Adresaro kaj membrokarto: Finfine ni esperas baldaŭ publikigi adresaron de niaj membroj. Ni dezirus fari en ĝi distingon inter vere junaj membroj kaj pli aĝaj apogantoj, sed ni scias ke se ni demandus al ĉiuj membroj

ilian aĝon, la respondoj estus malmultegaj. Ni jam havas membrokartojn por doni al ĉiuj pagintaj sian kotizon.

6ª) HEJS-tendaro: Laŭ vi jam scias, ni projektis - la okazigon de HEJS-renkontiĝon en Zaragoza kampadejo de la 23ª de Majo, festa ĵaŭdo, ĝis la 26ª dimanĉo. Ni jam petis al vi sciigi al ni pri via ebla partopreno. Ĝis nun, neniu skribis al ni pri tio. Se ni ne ricevos sciigojn pri partopreno aŭ ili estos malmultaj, la -- HEJS-tendaro ne povos okazi. Do, denove ni petegas al la eblaj partoprenontoj ol skribi nin pri tio nun. Ni varme akceptos ĉiujn sugestojn kaj kunlaborojn.

= = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = =

# NOVA ESTRARO

Kelkaj el la antaŭaj estraranoj troviĝas nun eksterlande. Ankaŭ, pro aliaj kaŭzoj aliaj ne povas daŭrigi sian agadon.

Tio devigas ŝanĝi la estraron.

Do, la nova estraro estas :

Prezidanto:
S-ro- Miguel Angel Altuna, el Bilbao .

Vic-prezidanto pri rilatoj kun TEJO :
S-ro. Juan Azcuénaga, el Santander

Vic-prezidanto pri rilatoj kun niaj delegitoj:
S-ro. Johano Guiñon, el Barcelono.

Sekretariino:
F-ino. Laura García, el Bilbao.

Vic-sekretariino :
F-ino. Mercedes Castro, el Bilbao.

Kasisto :
S.ro. José Miguel Fernández, el Bilbao.

Voĉdonanto kaj redaktorino de HEJS-revuo :
F-ino. Itziar Arteche, el Bilbao.

Voĉdonanto :
S-ro. José Carlos Quintas, el Vigo.

Voĉdonanto :
S-ro. Johano Ramoneda, el Sabadell.

Voĉdonanto :
S-ro. Petro Pérez, el Bilbao.

Voĉdonanto :
F-ino. María Gálvez, el Bilbao

Laŭ vi povas rimarki, kelkaj el la estraranoj ne estas el Bilbao.

Tiel ni deziras montri la nacian signifon de nia sekcio.

Ni esperas ke, malgraŭ la neeblo kunsidi - la tuta estraro en normalaj cirkonstancoj, ofta interkomunikado faciligos glatan funkciigon de la organizo.

--Someraj Universitataj Kursoj:

La estraro de ĉi-tiu asocio deziras publikigi sciencajn kursojn, preferinde en la formo de universitataj lernolibroj.

Interesitoj pri verkado, mendu informojn ĉe :

SOMERAJ UNIVERSITATAJ KURSOJ

Boite Postale,9, B- 40000 -

LIÈGE - 3 - BELGIO- 1850.91

& & & & & & & & & & & & & & &

Anoncojn kaj informetojn oni adresu al:

S-ro. Ernst Glättli, SAEF-sekretario.
Laurstrasse 17, CH-5200 Brugg (Svislando)

.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-

## Balance al 31-12-73

| | | |
|---|---|---|
| Gastos impresión revista, mater. ofic. y expedición (1) | 29.019.- | |
| Gastos congreso Madrid y reunion Santander. | 2.020.- | |
| Compra libros. | 800.- | |
| Donatigo a H.E.F. | 500.- | |
| Pago de cuotas a H.E.F. | 2.320.- | |
| Pago de cuotras a T.E.J.O. | 1.000.- | |
| Donativo a G.E.B. | 500.- | |
| Capital a 31-12-72 | | 16.256,65 |
| Cobro cuotas 73 y atrasadas. | | 23.244.- |
| Cobro cuotas 74 y atrasadas. | | 1.900.- |
| Donativos. | | 1.559,80 |
| Intereses cta. cte. | | 81,97 |
| Beneficio Loteria. | | 8.105.- |
| Caja y Bancos. | 77.707,42 | |
| Pendiente de pago. | | 2.269.- |
| Pendiente de cobro. | 1.100.- | |
| Loteria pendiente de pago a nuestros socios (2) | | 61.550.- |
| SUMAS | 114.966,42 | 114.966,42 |

(1) Compra de una maquina de escribir para confección de la revista y correspondencia a nuestros socios y colaboradores.

(2) En el sorteo de Navidad tuvimos la suerte de que nos toco cinco Ptas. por peseta jugada.

.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.

# INTERNACIA SEMINARIO DE G.E.J.

La 17ª IS okazis dum la tradicia postkristnaska semajno, ĉi tiun fojon en tre luksa kaj taŭga junularrenkontejo, kiu tamen ne estis tro multekosta. Eĉ la hejtilo funkciis, fakto, kiun aprezos la partoprenintoj de la 16ª IS.

La ejo situis for de ĉia civilizo en la urbaro de la germana centra montaro. Car do ne eblis ĝui multajn allogaĵojn de ĉirkaŭa mondo, la programos de la IS estis sufiĉe plena de laborgrupaj kunsidoj, aparta seminario de la Komisiono por Eksteraj Rilatoj de TEJO (KER), distraj aranĝaĵoj, akcepto de la urbestro, kaj kulmine la tradicia silvestra balo. La laborgrupoj ĉiuj temis pri specifa aspekto de la krada temo "realeco kaj utopioj". Oni diskutis pli-malpli fruktodone pri "la emancipado de virino", "Esperanto en la spegulo de ĝia originala literaturo", "la organizado de Internacia Junulara Kongreso" kaj vico da aliaj temoj, inter kiuj menciindas la grupdinamikaj kunsidoj, kiuj okazis pro speciala deziro de la partoprenintoj de la antaŭa seminario. La aparta seminario de KER traktis la nunan ĉeflinion de TEJO, nome laŭgedon sur la tereno de lingva kaj kultura imperiismo. La laboro baziĝis parte sur la du broŝuroj pri la potencrilatoj sur lingva kaj kultura terenoj, kiuj estas senpage haveblaj ĉe KER en Esperanto kaj aro da naciaj lingvoj, kaj krome la partoprenantoj aŭskultis kun intereso prelegon pri la laboro de nee-ista organizaĵo, kiu luktas kun similaj problemoj.

Distron trovis la partoprenantoj ne nur dum la balo, sed ankaŭ en ĉiuj truoj de la programo, dum la tuta nokto, kaj ĉiam kiam kunestis pli ol unu homo. Kulmino eble tamen estis la silvestra balo, dum kiu en tre vasta salono oni ludis, babilis, dancis ĝis elĉerpiĝo kaj malplenigis botelojn multnombrajn. La venontan tagmezon kelkaj estis jam, aliaj ankoraŭ vekaj.

Resume direblas, ke la ĉirkaŭ 65 partoprenantoj el 14 landoj havis la eblecon esperantumi intense dum tuta semajno, kaj mi havis la impreson, ke ili utiligis tiun eblecon kun granda ĝuo, tiel ke fariĝis la IS tre sukcesa.

Ĝis revido dum la IJK en Münster, aŭ dum la venonta IS!

<u>KLAUS SCHUBERT</u>

# 1-a AŬTUNA KATALUNA JUNULARA ESPERANTISTA RENKONTIĜO

. Gallifa 27 - 28 de Oktobro .

Dum la 27-28 de Oktobro okazis en Gallifa, pitoreska vilaĝo de la provinco de Barcelona kaj konkrete en la kampara domo "Can Font" la 1-a Aŭtuna Kataluna Junulara Esperantista Renkontiĝo kies organizadon zorgis la Junulara E-Sekcio de Sabadell (J.E.S.S.) .

Jen resumo de la evento kiu disvolviĝis en amikeca etoso, kun agrabla temperaturo kaj kiun ni profitis por perfektigi nian esperantan kapablon.

SABATON - 27-an.

Je la 19,00 horo oni malfermis la Renkontiĝon. Salutojn, bonvenojn kaj aliajn amikajn esprimojn oni aŭdis ĉiuloke.
Je la 20,00 horo la porokaza "kuiristo", avertis nin ke la vespermanĝo jam estis preta, do, ni vespermanĝis en loko tre proksima al "Can Font".
Post la manĝado okazis la unua parto de la programo, ĉiam ĉirkaŭ gojiga fajro, kaj kiu konsistis el ludoj kaj objektiva kritiko al la unua aktorado de la trupo de J.E.S.S. okaze de la surscenigo de "Verda aŭ Nigra" en la kataluna Renkontiĝo de Calella.
La duan parton de ĉi tiu vespero ni dediĉis al kantado kaj muziko. Ni instalis teleskopon per kiu ni observis iujn planedojn kaj stelojn kun sekva komentario.
Kompreneble ni iris al dormejo je tre malfrua horo.

DIMANĈON - 28-an.

Je la oka horo ni jam estis pretaj por la matenmanĝo. Poste ĉiuj promenis ĝis la akvofalo de "Can Font" kie okazis ĝimkano.
Je la 12, horo ni tagmanĝis kaj sekve oni disdonis la premiojn. Adiaŭo kaj reveno al niaj respektivaj lokoj.

Do, jen kiel okazis la menciita Renkontiĝo, profitante la okazon por vin inviti al venontaj.

Nome de J.E.S.S.



Angel Parera (SABADELL)

# KONTAKTO

## 1°: ENKONDUKO

1963. Jaro de la Junularo en la Esperanto-movado. Aperas tiam KONTAKTO. Sed, kion celas KONTAKTO? Tiama redaktoro skribis: "Ni volas per KONTAKTO doni al TEJO karakteron, kaj montri ke ĝi ja ne estas inerta kaj senviva organizo" (Humphrey Tonkin).

Post dek jaroj KONTAKTO bubiĝas kaj nunaj redaktoroj (Win Jansen, Ulrichs Lins, Simo Milojević) "firme esperas plumarŝi sur tiu vojo, kiun Tonkin difinis kiel la redaktan principaron de KONTAKTO": "Ni celas ne simple liveri al vi en KONTAKTO nur ankoraŭ alian novajfoliaron aŭ anoncaron, sed veran gazeton, kies enhavo ne pritraktu simple Esperanton, sed ankaŭ tiujn problemojn, kulturajn kaj sociajn, kiuj tuŝas la junularon, kaj tiujn apartajn interesojn kiujn havas gejunuloj".

Do, KONTAKTO celas esti ne plia informilo de la Esperanto-movado, sed plia revuo kiu utiligas esperanton kiel komprenilo. Dek jaroj pasis kaj nun KONTAKTO "bubiĝas". Tiu kiu atente legis ĉiujn numerojn povas certigi ke KONTAKTO plenumis kontentige tiun celon; tamen, ĝi sekvis similan evoluon ol tiu de la ideologio de TEJO mem. De tempoj de nekomprenebla neŭtraleco ĝis la nuna gvidlinio de aktiva neŭtraleco. De tiu mistika ideo pri la rolo de esperanto, ĉiam forgesante la samtempan mondon, ĝis la nuna praktika apliko de la Deklaracio de Tyresö per organizo (TEJO) malfermata por diskuti lingvajn problemojn kaj diskriminaciojn ne nur pri Esperanto, sed en Esperanto, kaj preta ankaŭ por kunvivi en la hodiaŭa mondo la nuntempajn problemojn, ne nur de la homaro ĝenerale, sed ankaŭ de minoritatoj, ĝenerale de lingvaj minoritatoj.

Kadre de tiuj ideoj mi povas mencii kelkajn gravajn temojn prezentitaj: malsato, nasklimigo, eduka kaj lerneja sistemoj, sekso, labortendaroj, kulturo, Tria Mondo, gastlaboristoj, hommedio, ... kaj la lasta pri la 29a IJK okazinta en Sarajevo. Multaj artikoloj elstaras, sed ĉi tie mi ne eblas ĝin, mencii, do mi klopodos nur komentarii ĉi lastan revuon.

Laŭ mia opinio, estas revuo kiun devas legi ĉiu juna esperantisto, precipe pro aktualeco de sia enhavo por kompreni ke nia movado bezonas iom pli ol "verdaj turistoj".

# 2ª: PRI SARAJEVO

Debutas S-ino Flóra Szabó-Felsö, nova prezidanto de TEJO kaj unua prezidantino en la historio de nia tutmonda organizo. Ŝia artikolo "Post Sarajevo" temas pri la celoj de TEJO en la nuna laborperiodo: kunlaboro kun diverstendencaj junularaj organizaĵoj (danĝera vojo sur kiu TEJO, laŭ decido de la Komitato en Torun, 1972, nek ALPRENOS nek FAVOROS partipolitikan starpunkton), rilatoj kun UEA, pli da atento al la ekstereŭropaj junaj esperantistoj, plifortigo de varbado, zorgo de nunjara IJK kaj de ĝia temo "Edukado".

La kongresan raporton kiel "Leciono el Sarajevo" verkis Simo Milojević. Li opinias ke "se nia Movado volas revolucii la mondon (almenaŭ rilate la internacian komunikadon), tiam al ĝi ne konvenas la taktiko de oldiĝinta damo, kiu volas plaĉi al ĉiuj". Aparte elstaras malfermitecon de la kongreso al la ekstera mondo kun oftaj kaj multaj ekstermovadaj reeĥoj kiujn li kvalifikas kiel pozitivaj kaj altaprezaj.

En Sarajevo la kongresa rezolucio estis ligita al la kongresa temo, "Junularo kaj Hommedio", kaj al lingva diskriminacio, kaj finas jene: "La batalo por la Internacia Lingvo estas ero en la granda batalo por la homa emancipiĝo.

Prezidinto Renato Corsetti en sia artikolo "Esplori la mondon" atentas pri la senduba fakto ke se ni volas apliki Esperanton por internaciaj fakaj rilatoj devos ekzisti sufiĉa nombro da esperantistoj kiuj interesiĝas kaj ion produktas pri fakaj kampoj. Laŭ Corsetti, "esperantistoj devus eliri el siaj fermitaj lingvointeresoj kaj esplori la mondon kiu ĉirkaŭas ilin. Kiam ili interesiĝos pri aliaj aktualaj internaciaj problemoj, tiam verŝajne ili sukcesos uzi kaj uzigi la Internacian Lingvon por internaciaj rilatoj".

Alia prezidinto, Hans Michael Maitzen, skribas pri "Teknologia bumerango". La homa teknologio evoluas por faciligi la vivon, sed produktadrestaĵoj rompas kaj detruas ekvilibron de la naturo. Malgaja konsekvenco de tio estas morto de la naturo en la koncerna regiono.

Timiga kaj interesa estas "Aliaj minomatoj survojas". Stephan Mc Gill atentigas nin pri la Minomata-malsano pro hidrarga venenigo per daŭra manĝado de fiŝoj en Japanio. Prezentas aron da senkulpigoj de la malbeligaj industrioj kiujn analizis geografoj de Canterbury-Universitato, kaj finas per pridiskutindaj temoj pri malbeligo de la hommedio.

Malpurigadon de la atmosfero prezentas Jagoda Greger per sia "Kvarcent manieroj damaĝi la puran aeron". Problemoj kaj

danĝeroj de aersanitara krizo sur ne tre optimisma vidpunkto.

Pri la demografia eksplodo skribas Richard Cash: "Tempo de bebo inflacio". Li komparas antikvan legendon pri rekompencpeto pro ŝaktabulo kaj la demografian eksplodon de la homaro. Naturriĉoj elĉerpiĝos iom post iom, sed tro baldaŭ por industrio. La Tero ne kapablos produkti la necesajn nutraĵojn. Tiel nia nuna tendenco estas la certa morto de nia mondo post malpli ol cent jaroj.

Ulrich Brandenburg rememoras al ni per sia artikolo "Bremsi la urbiĝon" la bazajn principojn por moderna urboplanado akceptitaj en Ateno en 1933, nuntempe ofte forgesataj tiel en kapitalisma kiel en socialisma sistemoj. Por solvi tiun problemon li indikas kelkajn pripensendajn punktojn.

Pesimisma situacio atendas la homaron en la estonteco, ĉar la prognozoj pri la kresko de la monda loĝantaro kaj la bezono kreskigi samtempe la produktadon de nutraĵoj montras tion. Tia maniere reaktualiĝas la asertojn de Tomaso Maltus. Analizas tiujn supozojn Ivo Osibov, ankaŭ prezidinto de TEJO, en sia artikolo "Panon, ne bombojn", kvankam preskaŭ ne tuŝas la temon armiloj.

Kunaŭtoroj de "Baldaŭ malplena poto" estas Vaclav Vitek kaj Jindra Rehakova. Temas pri estonta malhavo de bezonataj vivhelpiloj, sed mankas statistikojn. Pri sama subtemo, sed el alia vidpunkto, temas la artikolon "Internacia faktobanko", verkita de Iva Aberg. Ŝi, tamen, nur zorgas pri UN-klopodoj kaj projektoj por starti internacian faktobankon de medio.

M. Resuloviĉ rilatas, per "La analfabeta globo", analfabetecon en neevoluintaj landoj kun iama kolonia sistemo kaj nuna kripliga situacio de lingva subpremado per la metropolaj lingvo kaj kulturo.

Tri specojn de pejzaĝo distingas Leszek Kordylewski en "Pejzaĝo, la nocio kiu malaperas". Li montras motivojn por transformoj kaj rimarkas metodojn por limigi tiun ĉi procezon.

Ni perdiĝas en amaso, ni estas fremdaj en nia propra urbo. Tion rememoras al ni Michela Lipari per "La urboj timigas". Ŝi ankaŭ mencias kelkajn proponojn por plibonigi tiujn situaciojn, eĉ kun partopreno de la esperantistaj kluboj.

Diferenca estas "Ijoko, lokoko, mortaj mefitoj kaj forgesitaj miozotoj". Richard Cash per lingvaj akrobataĵoj montras la malfermon de la kongreso al la "vera neverda mondo", la novajn intencojn kaj la certeco ke TEJO jam ne malŝparas sian tempon diskutante pri "mucida neŭtraleco", kies kadavron nur priflaras kaj palpetas en kelkaj "maturaĝaj" rondoj.



JUAN AZCUENAGA